# TEA-BULTENO

4ª JARO — DECEMBRO 2001 — NUMERO 10




## AGENDO



| | | |
|---|---|---|
| 1 | S | |
| **2** | **D** | |
| 3 | L | |
| 4 | M | Ni parolu Esperante! |
| 5 | M | |
| 6 | Ĵ | |
| 7 | V | Kartluda vespero |
| **8** | **S** | |
| **9** | **D** | |
| 10 | L | |
| 11 | M | Ni parolu Esperante! |
| 12 | M | |
| 13 | Ĵ | |
| 14 | V | Tago de la Libro |
| 15 | S | |
| **16** | **D** | **ZAMENHOF-TAGO EN TRIESTO** |
| 17 | L | |
| 18 | M | Ni parolu Esperante! |
| 19 | M | |
| 20 | Ĵ | |
| 21 | V | **KRISTNASKA FESTO** |
| 22 | S | |
| **23** | **D** | |
| 24 | L | |
| **25** | **M** | |
| **26** | **M** | |
| 27 | Ĵ | |
| 28 | V | **JARFINA FESTO** |
| 29 | S | |
| **30** | **D** | |
| 31 | L | |







*Al vi ĉiuj Bonajn Festotagojn!*



## Zamenhofa Tago

Esperantistoj tra la tuta mondo tradicie festas ĉi tiun tagon per renkontiĝoj, kunvenoj kaj diversaj agadoj por honori Lazaro Ludoviko Zamenhof, la elpensinton de nia lingvo. Do, jen nia programo:

**Vendredon la 14$^{an}$** de decembro, je la 20ª horo ĉe nia sidejo, ekspozicio pri esperantaj libroj. Sekvos legado de versaĵoj kaj prozaĵoj rilataj al nia Majstro.


**Dimanĉon la 16$^{an}$** planita estas vizito de la Ekspozicio "Koloroj ĉe sespieduletoj", ĉe Urba Mara Akvario. Temas ĉefe pri elmontrado de ekzempleroj el la entomologia kolektaĵo de la Muzeo pri Naturhistorio, plus kelkaj raraj vivantaĵoj, speciale breditaj de la Muzeo mem cele al repopolizado. Ĉeftemo la koloro, kiun oni pritraktas laŭ ĝiaj diversaj funkcioj: mimetismo, seks-allogo, ktp. Eblos vidi insektojn de eŭropaj specioj, papiliojn kun mirindaj desegnaĵoj, koleopterojn el Afriko kaj multajn aliajn naturajn mirindaĵojn.

Rendevuo antaŭ la Akvario - Riva N. Sauro 1 - je la 10ª horo. Sekvos bu fedo en TEA-sidejo.



### KRISTNASKA ...

**Vendredon la 21$^{an}$ de decembro**, vi estas varme invitataj ĉe **TEA**-sidejo por amika kuntostado. Ankaŭ ĉijare Kristnaska Paĉjo vizitos nin por persone transdoni kelkajn donacetojn. Do, vi estas atendataj ekde la 20ª horo.



### ... KAJ JARFINA FESTOJ

**Vendredon la 28$^{an}$ de decembro**, ni kune festos por adiaŭi la 2001$^{an}$ jaron kaj bonvenigi la 2002$^{an}$ . Ni atendas vin, multnombrajn!

### Bondeziroj

Festotagoj ja ĉeporde. Bela kutimo ankoraŭ rezistas: sendado de bondezirkartoj! Simpla bildkarto kun kelkaj vortoj kaj via subskribo ĉiam donas grandan ĝojon al ricevanto, ĉar ĝi estas atestilo de via sincera amikeco. Tiu ago kostas malmulte (aĉeto de karto+poŝtmarko), sed multon donas. Ĉe TEA-kasisto je via dispono buntaj kaj gajaj bondezirkartoj kristnaskaj kaj novjaraj.

### Grava atentigo!

Pro plialtigo de poŝtaj elsendokostoj, kun bedaŭro ni informas vin, ke la Bulteno ne plu aperos ĉiumonate, sed ĉiun duan monaton. Do, ekde januaro 2002 estos publikigita programo valida por du sinsekvaj monatoj. Ni esperas je via bonvola komprenemo, certaj ke ĉi tiu decido tute ne bremsos aŭ malhelpos vian partoprenemon en niaj programoj.

***Tea-estraro***

## ESPERANTA HISTORIO

*Humphrey Tonkin*

La usona eldono de la libro de Teodoro Ŝvarc (Tivadar Soros) MASKERADO ĈIRKAŬ LA MORTO (1965) aperis en la septembra monato ĉe Arcade Publishing, Novjorko, kun la titolo: MASQUERADE: DANCING AROUND DEATH IN NAZI-OCCUPIED HUNGARY.

Teodoro Ŝvarc estis unu el la tri fondintoj (kaj la ĉefa mecenato) de la revuo kaj eldonejo LITERATURA MONDO, en Hungario en la 1920aj jaroj (la aliaj fondintoj estis Kalocsay kaj Baghy). Li verkis du librojn, nome MODERNAJ ROBINZONOJ pri siaj spertoj en militkaptitejo dum la Unua Mondmilito (lastatempe reeldonita de Eldonejo Bero en Kalifornio) kaj MASKERADO pri la Dua Mondmilito. Li, lia edzino kaj la du filoj sukcese transvivis kiel judoj la nazian okupon de Budapeŝto, uzante falsajn identecojn kaj oficialajn paperojn.

Kvankam li naskiĝis kiel Ŝvarc, en la 1930aj jaroj li oficiale ŝanĝis la familian nomon al Soros; li tamen daŭre uzis la malnovan nomon en Esperanto-rondoj. Liaj du filoj, kiuj migris al okcidento tuj post la milito, estas hodiaŭ konataj kiel la granda financisto George Soros kaj la tre sukcesa inĝeniero Paul Soros. Ambaŭ loĝas en Novjorko. Kvankam hodiaŭ George estas tre skeptika pri la estonteco de Esperanto, siatempe li bone regis la lingvon kaj eĉ partoprenis la kongreson de TJO (la antaŭulo de la junulara organizaĵo TEJO) en Ipswich, Britio, en 1947.

Mia traduko de MASKERADO aperis en Britio pasintan jaron (Tivadar Soros, MASKERADO: DANCING AROUND DEATH IN NAZI HUNGARY, Canongate Books, Edinburgo). Ĝi estis bazita sur la Esperanta eldono de 1965, sed kun diversaj modifoj el anglalingva manuskripto de tiu sama periodo. Mi aldonis detalan postparolon pri la libro kaj pri la vivo de Tivadar Soros, klarigante interalie lian esperantistecon, kaj ankaŭ detalajn notojn. La libro ricevis grandegan atenton en la brita gazetaro (ofte kun abunda mencio de Esperanto). *Sunday Telegraph* aperigis eĉ kelkpaĝajn ĉerpaĵojn el la libro, kaj ankaŭ *The Mail on Sunday* dediĉis al ĝi kelkajn paĝojn. Aperis recenzoj en *The Times*, *The Independent*, *The Times Literary Supplement*, kaj aliaj ĵurnaloj kaj gazetoj. Broŝurita brita eldono aperos antaŭ la fino de la nuna jaro.

Recenzoj de la usona eldono (Tivadar Soros, MASQUERADE: DANCING AROUND DEATH IN NAZI-OCCUPIED HUNGARY) jam aperis en *Publisher's Weekly*, *Booklist*, kaj *Library Journal*. Kvankam *Booklist* ŝajne ne mencias Esperanton, la aliaj du ambaŭ notas, ke la libro unue aperis en Esperanto. Laŭ mia kompreno, *New York Times Book Review* planas recenzi la libron, *The New Yorker* ankaŭ aperigos artikoleton, kaj eĉ *Foreign Affairs* planas recenzon. Certe sekvos pliaj recenzoj, kaj jam radio kaj televido montras interesiĝon. Ĉu tiuj mencios Esperanton — kaj ĉu ili mencios ĝin favore — oni kompreneble ne povas antaŭvidi. Oni «oficiale» lanĉis la libron la 3an de oktobro.

En julio aperis ĉe UEA dua eldono de la Esperanta originalo, denove kun miaj postparolo kaj notoj (tradukitaj kompreneble en Esperanton). Jam aperis ruslingva kaj turklingva tradukoj de la libro (kaj redakta materialo) surbaze de mia anglalingva redaktita teksto; en preparo german- kaj hungar-lingvaj versioj.

La aperigo de la libro donas unikan okazon al usonanoj kaj aliaj atentigi pri Esperanto kaj ĝia kultura kaj historia rolo.



## Corso Multimediale di esperanto

Allegato al numero di dicembre della rivista INTER.NET (Interpuntonet), in edicola dal 20 novembre scorso, un CD in cui si trova anche un ottimo corso multimediale di Esperanto.

Il corso è reperibile anche su Internet sia nel sito del realizzatore che su altri siti che lo ripropongono tra cui www.linguainternazionale.it

Un utile e diverso regalo per Natale!

## Turismo esperante en Italio

*Informas Milana Esperanto-Klubo*

Jam de kelkaj monatoj peteblas en la turismaj oficejoj de la italaj urboj Milano kaj Parma la servoj de Esperanto-ĉiĉerono. Oni kuraĝe demandu kaj petu la esperantlingvan ĉiĉeronon por viziti la urbon. La ĉiĉeronado okazas kun samaj kondiĉoj kiel en aliaj lingvoj.



## POR SKRIB- KAJ VERK-EMULOJ!

Eldonejo KLEKS eldonis en 2001 MONDOJ, aron da 34 originalaj rakontoj, de 30 esperantaj verkistoj el 5 kontinentoj. Aŭspicie de Esperant-lingva Verkista Asocio kaj kunlabore kun E-Redakcio de Pola Radio, nun ĝi planas aperigi en 2002 samtipan libron: RAKONTARO 2002.

Jen la regularo:

**Kion oni skribu?** Nur originalajn kaj interesajn rakontojn, ne pli ol 7 paĝajn. **Kiom da?** Unu aŭ pli. **Kiam?** Sendu la rakonto(j)n nun, sed **nur ĝis** 31.12.2001. **Kien?** Al jenaj retadresoj

Georgo Handzlik handzlik@kleks.pl
Tomasz Chmielik dtch@wp.pl

Aŭ eventuale al:

Eldonejo KLEKS - ul. Braterska 41
PL-43-346 BIELSKO-BIALA

**Kiel?** Perrete la tekstoj estu nur en x-sistemo. Kune kun la rakonto(j) nepras sendi biografieton en ne pli ol 110 vortoj. Por minimume unuigi la biografietojn bv. mencii en ĝi:

1. Nomojn familian kaj personan (substreku la familian)
2. Ian klarigon pri la lando kiu vin koncernas (ekz: italo loĝanta en Svedio...)
3. Naskiĝjaron
4. Kion vi ŝatas fari en via libera tempo

La libro estas planata por UK 2002. Diplomoj, verdaj laŭroj kaj, kompreneble libra ekzemplero por la aŭtoroj.

**Kvizo** En kiu lingvo estas skribita la libro "Zil vol lolik"? 1. Ido 2. Novial 3. Volapük

**Atentu! Atentu! Dimanĉon la 16an de januaro 2002 okazos la Ĝenerala Jarasembleo de TEA.**

**Kelkaj artikoloj fontas el RET-INFO**


BULTENO de la membroj de
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo**: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
tel/fakso: +39 040 763128
Reto: esperantotrieste@.trieste.it; nored@tiscalinet.it
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro-Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349